

Je la fino de 1943, mia amiko Raymond Philippon pruntedonis al mi libreton « L'esperanto en dix leçons », kiun mi tuj uzis por lerni la internacian lingvon. Pro tiama okupado per germana povo, ni nenion pli povis fari ol babiladi kaj kanti en la trajno, kiu ĉiutage nin kondukis al Bruselo. La liberigo permesis al ni kontaktiĝi kun T.J.O. (nun Tutmonda Junular-Organizo). En 1946 ni renkontis belgajn kaj nederlandajn gesamideanojn kaj tiam komenciĝis mia leterkorespondado.

La unuaj korespondantoj estis junaj esperantistoj kaj esperantistinoj kiuj aperigis anonceton en « La Juna Vivo ». Kelkfoje la anoncon aperigis iu loka klubo kiu organizis « letervesperon » por disdoni la respondojn inter siaj gemembroj. Ankaŭ mi mem enmetis anoncojn en « Esperanto » aŭ « Heroldo », kun miaj deziroj pri historio kaj popola kulturo. Tiamaniere mi rikoltis plurajn dekojn da leteramik(in)oj. Ili tre malsimilis per ilia aĝo, de tre junaj komencantoj ĝis iuj plejaĝaj kies lingvo superis la mian. Ili ankaŭ tre malsimilis per iliaj interesoj. Kelkaj deziris nur interŝanĝi bildkartojn aŭ poŝtmarkojn. Kolektante bildkartojn mi estis tre feliĉa kiam mia korespondanto klarigis la montritan monumenton aŭ pejzaĝon. Tio bezonas ofte pli ol kelkajn liniojn, kaj tiel ni komencas korespondi per pli malpli longaj leteroj.

Tiu leterkorespondado renkontis kelkajn malfacilaĵojn, pro la uzita lingvo, pro la pritraktita temo. Uzita lingvo : kiam bulgara amiko demandis mian opinion pri la « komuna bazaro » mi ne tuj komprenis ke por li tio estas « komuna merkato » kaj ne io en tre granda malordo. Pritraktita temo : mia korespondado kulminis dum jardekoj 1960-1980, kiam en orienta Eŭropo regis komunismo. Kelkaj korespondantoj estis komunistoj, kelkaj certe ne, sed ŝajnas al mi ke nur kelkaj esprimis sincere ilian opinion. Aliaj prudente tute nenion skribis pri politika aŭ socia situacio, aŭ enmetis kelkajn aprobantajn liniojn. Tamen kelkaj, el Letonio, Hungario, Ĉeĥio, klare rakontis faktojn kiuj montris ke ili ne estis kontentaj de la reganta reĝimo.

De 1952 ĝis 1962 mia edzino kaj mi mem ni korespondis kun Ilonjo Illès, Budapeŝtino. Rapide la du virinoj virinoj amikiĝis ĉar ili ambaŭ havis kvar infanojn. Ni neniam skribis pri rusa interveno de 1956, sed tra ŝiaj longaj leteroj ni povis kompreni ŝian malfacilan ĉiutagan vivon. Suna radio estis por Ilonjo ŝia semajna ĉeesto en loka esperantista klubo kie fama hungara verkisto Julio Baghy legis siajn poemojn. Bedaŭrinde, ni neniam povis renkonti Ilonjon.

Ni havis en 1978 eblecon veturi al Pollando kaj tiel konatiĝi kun unu el miaj polaj gekorespondantoj, Zuzanna Kawulok, muzikistino, kantistino. En siaj leteroj Zuzanna bele klarigis kial kantoj kaj dancoj, de ensemblo Mazowsze, de mi ŝatataj, ne estas pura folkloro.

Ni vizitis ŝin en Istebna, vilaĝeto en Beskidmontaro, kaj ŝi gastigis nin en sia malnova domo. Ŝi montris siajn popolajn instrumentojn, sakfluton kaj longan paŝtistan kornon.



Mi konsilas al vi, karaj legantoj, serĉi per interreto « Zuzanna Kawulok ». Vi trovos, ankaŭ en esperanto, tre interesajn informojn pri Zuzanna, mortinta en 2018. Vi vidos ke ŝi ne nur ludis gravan rolon en esperantista movado sed ankaŭ por defendo kaj disvastigo de kampara popola kulturo en suda Pollando. Kaj ankaŭ vi povos konstati ke popolaj kantoj kaj dancoj vigle vivas tie, ne kiel rigardebla spektaklo sed kiel societa festa praktiko.

